ANTAŬEN
suplemento de Informilo
2/24 junio 2016

❖❖❖

Ĉi-vespere kantis tenoro. Ekde la unuaj voĉsonoj io karesa kaj agrabla tuŝetis la koron, forportante ŝin al la karaj antaŭmilitaj jaroj de la malproksima infanaĝo kaj ia neklarigebla forto forprenis la animstreĉon. Ŝajnis, ke li kantas nur por ŝi.

Okazis miraklo! Dank´ al la varmeco de lia voĉo ŝi kvazaŭ vekiĝis post inkubsonĝo, kvazaŭ ili iĝis kunigitaj per nevideblaj fadenoj. La sekvantan tagon la kunlaborantoj rimarkis, ke Maria estas kontaktema.

Fine Maria revenis Leningradon, loĝis sola, laboris en malsanulejo. La admirinda voĉo restis neforgesebla, kvankam ŝi ne konis lian nomon.

Iuvespere ŝi iris laŭ la strato. Tiu tago montriĝis unu el la nigraj. Sur la operacitablo mortis virino kaj ŝi kulpigis sin pro tio. Sed kuracisto ne estas sorĉisto... Kial do ŝi staras meze de la trotuaro? Kio emocias kaj samtempe trankviligas la animon? Kiel savanta akvoguto dum varmega tago, kiel subita resaniĝo post gravega malsano, tiel rekonsciigis ŝin la konata voĉo – tiom kara kaj proksima. Ŝi staris senspire, ravita... Kiam finiĝis la kantado, Maria alkuris al la malfermita fenestro kaj ekvidis knabinon sidantan sola ĉe malnova gramofono.

„Bonvolu, vendi al mi tiun diskon. Mi pagos la plenan sumon, nur vendu ĝin al mi. Mi petegas vin!" turnis sin Maria al la junulino, kies mirigita rigardo estis direktita al ŝi. "Bonvolu preni ĝin senpage. Mi havas ankoraŭ la saman. Jes, ankaŭ al mi tre plaĉas aŭskulti la admirindan voĉon de Mario Lanza." Nun Maria posedis la gramofondiskon de la amata kantisto kaj ekkonis lian nomon.

Ĉi-vespere reveninte hejmen, ŝi ĝuis lian dian voĉon. De nun ŝi rapidis loĝejen, kie atendis ŝin Mario Lanza... Ŝi akiris ĉiujn aĉeteblajn diskojn, presaĵojn pri lia vivo, rigardis filmojn, kie li aktoris. En ŝia ĉambro de sur la muroj ridetis Mario Lanza kaj ofte sonis lia korecoplena voĉo. Por kompreni, pri kio li kantas, Maria komencis studi la anglan kaj italan lingvojn.

En la jaro 1959 Maria kiel turistino vizitis Italion. Ŝi trovis, kie loĝas en Romo Mario Lanza kaj vespere longe promenis preter la granda antikva vilao, de kie aŭdiĝis infana rido. Maria sciis, ke la kantisto havas edzinon, du knabojn kaj du knabinojn.

Ho, kiel ŝi esperis ekvidi lin kaj ekaŭdi lian tiom amatan voĉon. Iu tuŝetis pianklavaron, provante kelkajn akordojn kaj nenio plu... Post la vojaĝo tra Italio la turista grupo la 7-an de oktobro revenis Romon. Ĝuste la saman tagon en hospitalo subite mortis Mario Lanza. La itala ĉefurbo funebris pro la forpaso de la eminenta samlandano, kies talento ĉarmis aŭskultantojn de la tuta mondo. Inter miloj da italoj troviĝis modesta virino el la malproksima urbo Leningrado kaj neniu sciis, kian neordinaran rolon ludis la kantisto en la sorto de tiu rusino.



J. + M. Jelínek, Jílemnice

La saĝulo kaj la muelisto (fablo)

Iu saĝulo venis al muelejo pro mueli iom da greno. La muelisto petis lin atendi iomete, dum la greno mueliĝos kaj foriris. La saĝulo observis la procedon. Bovo kun sonorileto surkole, kies jugo estis alligita

al la muelŝtonoj, rond-iradis, turnante la muelilon. Baldaŭ la muelisto revenis kaj donis al la saĝulo sakon da faruno.
„Mi volas demandi vin," diris la saĝulo, „oni konsideras vin homo tre praktika kaj ŝparema. Kial do vi faris tiun sensencaĵon? Kial via bovo havas sonorileton sur la kolo?"
„Ho, tio estas tre simpla. Kiam la bovo marŝas, la sonorileto sonoras kaj mi povas fari aliajn aferojn. Se ĝi haltos, mi tuj ekaŭdos, ke la besto ne laboras. Tiam mi venas, piedpuŝas ĝin kaj ĝi rekomencas la laboron." „Sed ĝi ja povus halti kaj nur svingi la kapon, ankaŭ tiukaze la sonorilo sonorus kaj vi pensus, ke la bovo laboras."
„Ne, mia bovo ne estas tiom saĝa, kiel vi."

J. + M. Jelínek, Jílemnice

Venontaj esperantistaj renkontiĝoj por la somero kaj aŭtuno 2016 en Ĉeĥio

18. 6. Renkontiĝo en Havířov

19. 6. Internacia montara renkontiĝo en Velká Čantorije

17. - 30. 7. Somera Esperanto-tendaro Lančov (2-a etapo)

19. - 23. 7. Ekskursa antaŭkongreso en Svitavy

23. - 30. 7. La 101-a UEA kongreso en Nitra, Slovakio

31. 7. - 12. 8. Somera Esperanto-tendaro Lančov (3-a etapo)

12. - 14. 8. La 19-a renkontiĝo de tendar-geamikoj Lančov

13. - 16. 10. La 16-a kongreso de Ĉeĥa E-Asocio Pelhřimov

17. - 20. 11. Konferenco pri aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko en Modra, Slovakio red.